

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1976/77

Nº6(39)

Februaro

SEJM KAJ UEA

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas internacia tegmenta organizo por multaj landaj kaj fakaj E-organizoj. Bedaŭrinde, en Sovetio ĝis nun ne ekzistas E-Asocio, aliĝinta al UEA, diference de Pollando, Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Jugoslavio, Tial SEJM devis surprizi parton da kunlaboro kun UEA.

Io jam estas farita. UEA nomumis sian ĉefdelegiton en Soveta Unio. Plivastigas la reto de UEA-delegitoj. UEA laŭeble helpas membriĝi al negranda kvanto de plej aktivaj esperantistoj.

Konforme al la lastjaraj tendencoj de UEA, ni plifirmigu niajn kontaktojn kun la lokaj partiaj kaj sindikataj organizoj, ni konvinku ilin pri la utileco de Esperanto, ni uzu ilian helpon.

Ni pli ofte informu pri nia agado kaj pri niaj konceptoj sur la paĝoj de la revuo "Esperanto" - organo de UEA. La Propaganda fakto de SEJM starigu firman kontakton kun la Komisiono pri informado de UEA.

Okaze de ĉiu Universala Kongreso estas aranĝataj Belartaj Konkursoj. Ni partoprenu ilin, popularigante niajn verkojn, ricevante premiojn. En 1978 okazos UK en Varna (Bulgario). Multaj el ni havos ŝancon ĝin traf!. Ni do provu amase partopreni en la Internacia Ekzameno, kiu estas, jes, tre komplika, sed ankaŭ ja tre prestiĝa. Jam nun ni komencu prepari nin al ĝi.

UEA multe klopodas disvastigi Esperanton en landoj, kie E-movado forestas aŭ estas tre malforta. Ĝi instigas instrui la lingvon al eksterlandaj studentoj. Tia laboro jam estas farata ĉe ni, ekzemple, en Ivanovo. Sed certe estas multaj aliaj urboj, kie ni povus instrui al eksterlandaj studentoj.

Por siaj vastaj planoj UEA bezonas rimedojn, kiuj estas nun tute neŭfiĉaj. Ĝiu sukceso de UEA estas sukceso ankaŭ por ni. Do ankaŭ ni donu materialajn kontribuojn, eĉ se ili estas ne tro grandaj. Oni sendu donace superfluaĵojn E-librojn, belajn bildkartojn ktp. laŭ la adreso: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3002 Rotterdam, Nederlando. La sendaĵojn afranku per valoraj poŝtmarkoj.

Pere de niaj korespondamiko ni serĉu eblon pagigi niajn membrokotizojn.

Pri la demandoj, koncernantaj UEA kaj kunlaboron kun ĝi, turnu vin al mi (450025 Ufa, abonkesto 162).

B.Kolker, komitatano kaj ĉefdelegito de UEA en Soveta Unio.

ĈU ESTAS IA DISCIPLINO?

Ĝi-jare Poltava klubo akceptas Okcidentan SEJTON kaj SEJM-Konferencon. Ĉiuj, kiuj jam preparis E-tendaron, scias ke tio ĉi ne estas simpla afero. Jam nun la Prepara Komitato bezonas sili proksimuman kvanton de lokoj, necesaj por OkSEJT kaj Konferenco, tial ĝi per "A" kaj "Kurte" anoncis peton sendi proksimumajn mendojn ĝis la 15-a de januaro 1977. Hodiaŭ estas jam la 30-a de januaro, do kiaj estas la rezultoj? Mendojn sendis 10 kluboj! El ili nur 4 apartenas al Okcidenta parto de Sovetio. Ni ricevis mendojn eĉ el Novosibirsk kaj

Kamĉatka, sed eŭropaj E-kluboĵ silentas. Interese, pri kio ili pensas? Ĉu tiuj kluboj ne volas partopreni la tendaron?

Tia senrespondeco malhelpas al preparlaboroj de OkSEJT kaj Konferenco.

A. Kolesnik, sekretario de la Prepara Komitato de OkSEJT-19.

NE LA LINGVO, SED LA HOMOJ

"Ĉu Esperanto estas nura ilo?" - tiu demanda titolo kronas la malferman artikolon de "Aktuale" N^o5(38). Per tiu demando A. Ĥarkovskij kontraŭbatalas la artikolon de D. Blanke "Esperanto - instrumento!" ("der esperantist", N^o5/1976).

Mi tre ne ŝatas paroli, des pli - artikoli. Sed la rebato de k-do Ĥarkovskij devigis min esprimi mian personan opinion pri la temo. Ĉar mi ne konsentas kun la ideoj, esprimitaj en la rebato. Kaj mi subtenas la pruvojn de k-do Blanke, kiuj estus la plej bona respondo al la rebato de k-do Ĥarkovskij, se nur la rebatata artikolo estus publikigita kune kun la rebatanta.

Kio estas Esperanto? Esperanto estas lingvo. Kio estas lingvo? Lingvo estas rimedo de la homa interkomunikado.

Esperanto, kiel rimedo, ne naskas internaciistojn, sed la internacisma sento igas homojn serĉi rimedon por interkompreno, igas ilin lerni Esperanton, kiu estas tre taŭga ligilo por internaciistoj - diverslingvanoj. Sed multaj, eĉ sciante pri ĝia ekzisto, bonege efektivigas siajn internacismajn ligojn pere de aliaj lingvoj - iloj, ofte eĉ ne bezonas Esperanton. Dume Esperanto ludas mondscale tre mizeran internacian rolon kompare kun pluraj lingvoj naciaj.

Esperanto mem ne portas ideojn. Ilin portas la homoj, kiuj utiligas Esperanton por apliko de tiuj ideoj kaj erare opinias, ke ne ili mem estas la ideoportantoj, sed la lingvo. Kaj tiuj opinioj povas naski la konkludon: Esperanto enhavas la "internan ideon" kaj infektas per ĝi la homojn, kiuj farigas "iloj" por tiun ideon transporti. Ĉu tiel necesas kompreni vin, k-do Ĥarkovskij?

Certe, kompari Esperanton kun la naciaj lingvoj ne eblas. Pli ĝuste - kompari eblas, nur egaligi ne eblas. Ĉar Esperanto kaj la naciaj lingvoj havas tuĝe malsamajn rolojn. Eblas diri, ke la lingvoj naciaj ofte, preskaŭ ĉiam, dividas homojn, kaj Esperanto ilin kunligas. Estus pli ĝuste diri, ke helpas-malhelpas kunigon-dividon de homoj ne la lingvoj mem, sed scio-nescio de tiuj lingvoj. Tamen, ĉu ne okazas ofte, ke komuna lingvo ne povas kunligi malsamideanojn samnaciajn? Ĉu ne okazas ofte, ke malsamlingvanojn kunligas komunaj ideoj, eĉ sentoj, kaj nur poste ili trovas komunan lingvon - la ilon -rimedon, la helpilon por pli intima samideaniĝo? Ĉu ne okazas, ke komuna lingvo eĉ malproksimigas homojn, kiam ili komencas kompreni (pere de la lingvo!), ke iliaj ideoj malsamas?

Mi ne volas nuligi, eĉ ne malgrandigi la internacisman rolon de Esperanto. Ĝi estas granda, ĝi povus esti kolosa, sed tio venos, kiam la nesufiĉa uzado de la internacia helplingvo en la senbride kreskanta diverskampa kaj diversnivela kunagado de la homaro igos erupcion la konservativecon de la socia opinio pri la roloj de la naciaj kaj la internacia lingvoj, devigos la homojn ŝanĝi siajn misopiniojn. Kaj tiun erupcion devas prepari ni - la internaciistoj armitaj per la mirinda interkomprenilo - Esperanto, libera de nacisma rezervemo, tiom kara por la lingvoj naciaj.

Tion ni povas fari ne per nebulvorta propagando pri la "interna ideo" de Esperanto, sed per konkreta kaj ĉiufanka aplikado de Esperanto en porpaca agado, en scienco, en literaturo (tradukado pli ol verkado, ĉar la tradukado vere internaciigas la naciajn kulturperlojn), en turismo, en sporto, en teatro kaj kinofilmoj, en duflankaj kaj multflankaj asocioj de amikeco, en ligoj inter ĝemelurboj

ktp, ktp... Nur tio allogos neesperantistajn rondojn, kiuj dum tro kredas la ĉiopovan kunligan rolon de fremdaj lingvoj. Nur realaj kaj nerefuteblaj rezultoj kredigas la nekredulojn.

Konklude mi denove asertas: nur la homoj estas portantoj de demokratio, internaciismo kaj ĉiuj aliaj noblaj kaj nenoblaj ideoj. Esperanto estas kaj ĉiam restos nur tauga rimedo kaj ilo por tiujn ideojn apliki.

V. Samodaj (Moskvo).

KIEL LUKTI KONTRAŬ "SENPEZA ŜELARO"

En januaro 1977 mi tralegis libron de Konstantin Paustovskij "Poezia elradiado" (eldonis "Molodaja gvardija" en 1976 - noveloj, rakontoj, leteroj). En la libro sur la paĝo 65 la verkisto rakontas: "...Ficovskij devigis min ellerni internacian lingvon "esperanto". Tiu ĉi senkolora lingvo, elpensita de varsovia dentkuracisto Zamenhof, havis tiun avantaĝon, ke ĝi estis facila. Tio estis ne lingvo, sed senpeza ŝelaro, forventumita de ĉiuj mondaj lingvoj.

Kaj tamen en tiu lingvo oni eldonadis en multaj landoj diversajn ĵurnalojn. En tiuj revuoj min interesis rubriko pri koresponddeziroj de esperantistoj. Laŭ ekzemplo de Ficovskij mi komencis korespondi kun kelkaj esperantistoj el Anglio, Francio, Kanado kaj eĉ Urugvajo. Mi sendadis al ili bildkartojn kun vidaĵoj de Kievo kaj responde ricevis bildkartojn kun vidaĵoj de Glasgovo, Edinburgo, Parizo, Montevideo kaj Kebeko. Polomete mi komencis variigi la korespondon. Mi petis sendi al mi portretojn de verkistoj kaj ilustritajn revuojn. Tiamaniere ĉe mi aperis belega portreto de Bajrono, sendita al mi de juna angla kuracisto el Manĉestro, kaj portreto de Viktoro Hugo, ĉin al mi sendis juna francino el Orleano..."

Tio estas fragmento el la novelo "Antaŭdelonga vivo" en la menciita libro de Paustovskij. Laŭ mia opinio, niaj oponentoj kun plezuro armas sin per eldiroj de verkistoj kaj aliaj diversbranĉaj famuloj, kiam tiuj eldiroj similas al komenco de ĉi tiu fragmento. Do kiel lukti kontraŭ oponentoj, kiuj uzas tiajn rimedojn? Pli-malpli spertaj esperantistoj kutime kapablas refuti argumentojn de kontrauesperantistoj, sed komencantaj kaj ne tiom spertaj esperantistoj plej ofte ne povas tion fari pro sia ĉi-flanka analfabeteo.

Ĉu ne povus ni en kadro de SEJM (ekzemple surbaze de la propaganda fako aŭ eĉ la metodika) verki kaj eldoni libreton kun eldiroj de famuloj pri Esperanto? Tiu libro enhavu, krom eldiroj favoraj al Esperanto, ankaŭ la malfavorajn, sed al la lastaj estu donitaj indaj klarigoj, ebligontaj sukcese kontraŭstari oponentojn, konstruitajn sur la malfavoraj eldiroj.

Kion opinias la redakcio de "A" pri tio? (Utila propono. - La red.) Kaj kion proponas vi, aktivaj legantoj de "A"? Persone mi kun vera plezuro partoprenus helpon al tiuj, kiuj ekupigus pri la verko, ĉar mi sufiĉe ofte kunpuŝiĝas kun la menciita analfabeteo de multaj esperantistoj, malhelpanta propagandi la lingvon, kaj bone komprenas la problemon.

Por verki taŭgan priesperantan opiniaron de famuloj necesas, ke ĉi-direkte aktive eklaboru ĉiuj SEJM-anoj, ja certe ĉiu havas sian propran arkivon, inter kies paperoj nepre troviĝos taŭga por la verko materialo.

B. Anonin (Ustj-Kamenogorsk).

POR PLI FACILE VARBI KAJ PREVENTI DISPUĜON

Ĉiuj scias, ke estas tre malfacile varbi por Esperanto kaj respektigi la varbiton en la kurso, poste en la movado. Ŝajnas al mi, ke por vasta esperantista publiko estos atentindaĵ miaj ĉi-rilataj spe-

rtoj, ĉar ili pruvas praktike valoron de nova instrua principo, kiam mi aplikas.

Kutime oni promesas al noviceo post proksimume unu jaro da lernado la eblon memstare korespondi kun eksterlando. Multaj nesufiĉe persistaj homoj ne toleras tiom longan atendon kaj "forvaporigas" el la kurso. Mi agas laŭ sekva metodo: noviceo komencas SAMTEMPE korespondi kaj lerni la lingvon. Paradokso? Ne! Por firme "hoki" la noviceon, jam en la unua leciono mi donas al li sekvajn taskojn: 1) ellerni 4 - 5 fundamentajn gramatikajn regulojn; 2) verki en la nacia lingvo kelklinian letereton, kiu invitas korespondi, interŝanĝi vizitojn, bildkartojn, poŝtmarkojn, librojn aŭ aliajn objektojn; 3) traduki kun helpo de vortaro tiun letereton (eventuale korektotan de mi); 4) dissendi dum proksimaj semajnoj similajn leterojn, bele afrankitajn, kun belaj bildkartoj ene, laŭ kelkdek eksterlandaj adresoj. Serdinte la leterojn, la noviceo fariĝas "hokito". Atendante la respondojn, li discipline lernas ĉion, kion postulas la instruisto. Pri "forvaporigo" jam tute ne povas temi. Post 15 - 30 tagoj venas la unua responda letero el eksterlando kaj la lernanton inundas maro da ĝojo. Li tradukas la leteron kun helpo de la vortaro kaj la instruisto. Kun la sama helpo li kompilas la respondon, samtempe partoprenante en la kurso, ktp. Intereso de la lernanto estas dekomence kaj konstante varmigata de la korespondo.

Estas necese, ke dum la kurso regu sekva principo: Ĉiu leciono estu skribado de letero eksterlanden al difinita korespondanto. En kadroj de la letterskribado la lernanto asimilas vortarojn kaj gramatikon. La konstanta korespondo havas sorĉan efikon: la kursano fariĝas iom post iom entuziasma esperantisto. Tion spertis milionoj da samideanoj.

Por povi liveri al ĉiu lernanto sufiĉan kvanton da korespondantoj, la instruisto devas disponi pri vasta reto de eksterlandaj instruistoj, kun kiuj li devas havi interkonsenton pri kunlaboro en interŝanĝo de taŭgaj adresoj de korespondemuloj. Anoncoj en revuoj plej ofte ne sufiĉas, precipe se temas pri adresoj de korespondemaj lernejoj.

Por ke la korespondo de la noviceoj ne lamu, la instruisto devas ne nur instrui, sed konstante kontroli la korespondon, instigi la lernantojn korespondi, ĉiel helpi en tiu afero, korekti erarojn, konsili temojn ktp. Sen tiu helpo lia instrua laboro ofte vaniĝas, ĉar la lernanto memstare ne povas apliki siajn lingvajn konojn, perdas fervoron kaj esperon kaj "forflugas" el la verda armeo. La instruisto de Esperanto tial ne rajtas lasi la korespondon de la lernantoj al arbitro de la sorto.

Oni povas oponi kontraŭ tiu ĉi metodo, argumentante, ke la instruisto devas multe labori, se li devos zorgi pri korespondo de ĉiu lernanto. Tio estas vero. Sed, se sperta instruisto ne zorgas pri internaciaj kontaktoj de siaj lernantoj, do la lastaj, malspertaj homoj, ne povante trovi interesajn rilatojn kun eksterlando, nepre starigas pravan demandon: "Por kiu celo mi lernu Esperanton?". Ne ricevante kontentigan respondon, tiuj homoj montras dorgon al Esperanto. Jen pro tio la kvanta stato de E-movado, anstataŭ kreski, preskaŭ ne ŝanĝiĝas dum jardekoj.

Mi konvinkiĝis, ke estas egale, laŭ kiu lernolibro aŭ metodo oni instruas Esperanton paralele kun la letterskribado. Ĉiu lernolibro, ĉiu metodo povas esti utila, se la instruisto kapablas vekti kaj daŭre subteni dum la lernado la deziron persone aŭ letere kontakti kun eksterlando per Esperanto. Eblas eĉ instrui Esperanton sen ajna lernolibro, sen ajna metodo, nur kun helpo de vortaro kaj ĉefaj gramatikaj reguloj, se la lernantoj estas tre persistaj kaj disponas pri sufiĉa libera tempo por traduki el Esperanto nacilingven kaj inverse. La ĉefa afero estas forta interesiĝo de la lernanto pri INTERNA- CIAJ KONTAKTOJ per Esperanto.

Dank' al la rakontita metodo la lernantoj malofte forlasas la kurson. Male: aplikante la metodon "Samtempe korespondigu kaj instruu", oni rimarkas tre raran por ni fenomenon, kiun oni iam observis de la vaste konataj kursoj de Andree Cseh: la kvanto de kursanoj en procezo de la lernado ne falas, kiel kutime okazas, sed kreskas. La kursanoj kun fiere kaj kontento rakontas al la konatoj pri siaj tutaj korespondaj sukcesoj, kaj ankau la konatoj ekdeziras sperti tiun romantikan dolĉan senton, kiun donas internaciaj plumaj kontaktoj kun homoj, loĝantaj trans cent riveroj kaj mil arbaroj. Des pli, ke krom dolĉajn sentojn la kontaktoj povas liveri tute palpeblajn rezultojn en formo de poŝtmarkoj, bildkartoj, revuoj, libroj, vizitoj ktp, ktp, ĝis... geedziĝo. Do, karaj geamikoj, energie korespondigu la novicajn disĉiplojn, se vi deziras, ke ili ne perdiĝu el la movade.

R. Grinšpan (Taŝkento).

MIAJ EKSTERLANDAJ IMPRESOJ

Dum lasta duonjaro mi feliĉe sukcesis efektiviĝi du interesajn eksterlandajn vojaĝojn - al Bulgario (septembro - oktobro) kaj Pollando (decembro - januaro).

En la belega gastama Bulgario estis neforgeseblaj renkontiĝoj kun samideanoj el BEA en Sofio, Plovdiv, Kazanlâk, Pazardĝik k.a. Du lastaj semajnoj en Bulgario pasis en tre agrabla E-medio, en la sino de Rodopi-montaro - urbo Velingrado, kie inter fabele bela naturo okazis la II-a Internacia E-Feriado. Ĝin partoprenis ĉ. 100 personoj el 6 landoj, inter ili tri el Sovetunio: M. Burgmeister (Riga), S. Krajnov (Moskvo) kaj mi. Aktiva ripozado, ĉiumatena "mikroturismo", montogrimpado, interesaj ekskursoj - proksimaj kaj foraj, amuzaj dancvesperoj... Ĉiuj partoprenintoj restis tre kontentaj pri sia restado en Velingrado. Mi arde rekomendas al tiuj, kiuj havas eblon veturi eksterlanden, aliĝi en 1977 al "ora bulgara autuno" - la III-a IEF en Velingrado.

Kaj en la fino de la pasinta jaro mi faris tre interesan kaj impresplenan monatan vojaĝon al Pollando, gastis en la urboj Vroclavo, Varsovio, Krakovo. Apud Krakovo mi vizitis la subteran muzeon en Veliĉka kun multaj haloj-salonoj, belege ornamitaj per skulptaĵoj, faritaj el ŝtona salo, pririgardis la salonojn de Nikolao Kopernik, de la sankta Antonio, de la reĝino Kunegunda - "kameron de la granda legendo" ktp - vere unikajn lokojn sur la tero...

Ĉie mi renkontiĝis kun lokaj samideanoj, kiuj volonte akompanis min. Dum kunvenoj en E-klubo mi ĝuis ilian varian kaj interesan programon. Precipe en Varsovia E-klubo, kie mi aŭskultis altnivelan prelegeton pri la kunmetitaj tempoj en Esperanto (laŭ la skemo de la mortinta s-ano Jan Zawada prelegis lia lernantino s-ino Szeziglińska), spektis belajn kolorajn lumbildojn pri la II-a Internacia E-Printempo en Mielno, apud Koszalin, en majo 1976, kiujn prezentis la iniciatinto de tiu ĉi nova E-aranĝo Marian Laba. Laŭ la peto de la ĉeestantoj mi mem faris improvize mallongan prelegon, rakontis pri E-movado en nia lando. Kiel "freŝbakita", tamen fervora subtenantino de SEJM, mi aparte akcentis en mia parolado la bone, saĝe organizitan agadon de SEJM, ĝiajn ĉiujarajn tendarojn, konferencojn, konkuradon de la E-klubo, laboron de diversaj fakoj ktp. La ĉeestantoj (ĉ. 30 - 35 personoj) kun granda intereso aŭskultis, starigis multajn demandojn kaj invitis ĉiujn dezirantojn pli aktive partopreni internaciajn E-aranĝojn en Pollando.

Unu el spertaj kaj aktivaj esperantistoj, s-ano Jerzy Gralak, en kies familio kreskas 6-jara fileto - denaska esperantisto, esprimis deziron trovi E-amik(in)on 30-35-jaran por korespondado kaj eventuala interŝanĝo de samtempaj familiaj vizitoj: li povas plene dispon-

igi al iu E-familio por la feria periodo sian oportunan loĝejon kaj atendas la samon de sia estonta amik(in)o. Jen lia adreso: 04-015 Warszawa, ul. Waszyngtona 37 m.76.

Kaj la adreso de d-ro Marian Laba estas: 75-546 Koszalin, ul. Szymanowskiego 2/4, Polska.

Agrablajn vojaĝojn en la nova jaro 1977 deziras al ĉiuj legantoj de "Aktuale"

N.Andrianova (Kievo).

LETERO EL RIGA

Estimataj gesarideanoj!

Denove en Riga aperis ebleco provi eldoni E-librojn. Ĉi-foje ni planas eldoni poezakolekton de fame konata latva poeto Aleksar Ĥo Caks, kies poezio estas plena de interesaj komparoj kaj propraj konkludoj kaj kies 75-jaran datrevenon (1901 - 1950) ni pasintjare festis. Lian poezion nun sama intereso legas ĉiuj generacioj sendepende de ilia aĝo kaj klereco.

Sed sukceso de la afero dependas de via helpo. Por pligrandigi la planitan eldonkvanton kaj certigi la eldonadojn pri aĉetado ni petas ĉiujn dezirantojn jam nun fari antaŭmendojn (ruslingve) laŭ la adreso: Riga, Kirova 57, Kniĝnaja lavka pisatelej, Mirdza Skuja.

La libro aperos fine de 1978. Estas planata eldono ankaŭ de aliaj libroj pere de Unio de Latviaj Verkistoj. Ĉiu komenco estas malfacila, tial ni esperas je via helpo kaj subteno - kiel eble pli granda ĝenerala antaŭmendo garantios regulan libroaperigon, konvinkos la eldonistojn pri neceso daŭrigi la eldonadon en la Internacia Lingvo.

Nome de Riga Junulara E-klubo: T.Bercis.

LUDU, SED GAJE!

Mi nomas la skribaĵon antiteze al la titolo "Ni ne ludu Esperanton!" ("A"-4, p.47), dezirante eldigi kelkajn rimarkojn pri la lingvistikaj rezonoj de la aŭtoro, ankaŭ tiuj de V.Silas, esprimitaj sur la sama paĝo.

La nocie mem "ludo" devus enhavi elementon de gajeco. Tamen ni ĉiuj bone scias, ke gaja ludo ofte finiĝas malgaje.

Instruaj kaj lingvaj ludoj en bonaj manoj povas fari la lernadon pli facila kaj la lingvon pli klara. M.Ziskandoviĉ pravas, ke ni devas scii, kiel kaj kie ni prezentu similan ludadon. Tamen la donitaj ekzemploj ne estas trafaj. La vortderivado en Esperanto ne estas limigita per iuj reguloj, la plej grava leĝo ĉi tie estas logiko kaj komprenebleco. La vortoj "bonas", "eblas" kaj similaj estas tute logikaj, kompreneblaj, lafundamentaj. Ĉiuj provoj krei tiusence limitajn regulojn frakasas sin kontraŭ la granita geniaĵo de Zamenhofs fundamenta vortaro - liberigo de vortoj je gramatikaj finaĵoj. Tamen tie, kie la "ludantoj" ne observas fundamentojn de la lingvo (ne nur la Fundamenton!) aŭ iras rekte kontraŭ ili, la ludado fariĝas malgaja kaj ĉiu serioza esperantisto devus deflankiĝi de tia "sporto".

V.Silas bedaŭras, ke la neologistoj atakas nur la "mal-vortojn", kaj iras ankoraŭ plu. Ĉu liaj proponoj estas senraciaj? Sendube, ili havas raciisman karakteron. Kial do ne akcepti ilin, komence almenaŭ en lia "propra" organo?

Sincere konfesante, ankaŭ al mi malplaĉas sufiĉe multaj formoj kaj vertoj en Esperanto. Estas eĉ realaj cirkonstancoj, ke mi povus eldonadi mian "propran" organon, uzante la formojn kaj vortojn pli belajn, pli mallongajn kaj pli raciajn ol en la "postrestinta" lingvo. Mi konas en nia lando almenaŭ du aliajn esperantistojn, kiuj es-

tas maturaj por eldoni "proprajn" organejn en propraj lingvoj aŭ dialektoj. Ni ĉiuj iom post iom kolektus "proprajn" taĉentojn de adeptoj. Tamen ni havu nenian iluzion: tiaj organoj baldaŭ bankrotus. Kial do?

Ĉar Esperanto estas jam delonge viva organismo, ĝi vivas kaj vivos kun siaj bonaj kaj malbonaj ecoj, same kiel aliaj vivaj lingvoj. Kiomfoje oni proponis ŝanĝi la vere malfacian ortografion de la angla lingvo, de aliaj naciaj lingvoj? La perfektigoj ĉiam estas refutataj. Kaj ankaŭ en tio estas sia racio. Kaj la multfoje refermita, eble jam perfektecen atinginta Ido - ĉu ĝi vegetas ankoraŭ? Kaj kiom da aliaj "perfektaj" artefaritaj lingvoj mortis?

Esperanto vivas nur pro sia saĝe kreita Fundamento kaj pro saĝeco de la plejmulto de ĝiaj adeptoj, kiuj komprenas, ke la domo ne povas longe stari, se ni forigos almenaŭ kolokajn brikojn el ĝia fundamento. Lingvo ne estas maŝino, kies ĉiujn detalojn oni povas ŝanĝi senĉeĝe kaj senlime. Lingvo konsistas el vivaj ĉeloj, kiuj reproduktas aŭ naskas nur tiajn samajn. Por ke naskiĝu novspeca ĉelo, estas necesa longa evoluo, kaj tiu nova ĉelo devas havi kapablon venki multajn barojn en sia vojo. Kial en ĉiu viva organismo.

Alia afero estas teoria esplorado pri perfekteco de la internacia lingvo. Diversaj solvoj de diversaj ĝiaj flankoj povas servi kiel bazo por estonta *l a u l e ĝ e* internacia lingvo. Tamen en la nuntempa praktika uzado ni ne rajtas malpurigi la aŭtoritaton de nia lingvo kiel *s t a b i l a*, *f a c i l a* interkomprenilo, sufiĉe riĉa por esprimi ĉion, kion bezonas la homa vivo, sed ne haviganta la Maŝinan riĉecon de la naciaj lingvoj.

Do ludu, sed nur geje, ne fuŝante la lingvon - la plej genian el ĉiuj lingvistikaj kreaĵoj. Pri justeco de la lasta aserto mi konvinkigas pli kaj pli malgraŭ tio, ke dum pli profunda studado de la lingvo mi rimarkas ankaŭ tiajn detalojn, kiuj, *l a ŭ m i*, oni povas solvi pli bone. *L e ŭ v i*, kara leganto, la sama detalo povas esti solvita alie, ankaŭ pli bone ol laŭ la Fundamento, ankaŭ ol laŭ mia solvo. Sed... lingvo ja ne estas maŝino.

A.Vaitilavičius (Vilnius).

NOVAJ DETALOJ

Ciolkovskij kaj Esperanto... Feliĉe por la historio de nia movado, simila temo ekzistas reale. Estas dokumentoj, publikigitaj rememoroj. Krom la konataj rememoroj de M.Popov estas tre lakona, sed ankaŭ konsiderinda mencio de V.Kiseljov, nepo de Ciolkovskij. En la sama kolekto de rememoroj sur la paĝo 254 li skribas: "Interparolis pri diversaj. Inkluzive de raketoj ĝis Esperanto."

Interalie, post la anonco en "Kurto" N-4 pri tiu ĉi libro la lastaj kelkdek ekzempleroj en Kaluga estis tuj disaĉetitaj. La estrino de la librovendejo diris al mi, ke la petoj venis el multaj urboj de nia lando.

Ankoraŭ unu interesan fakton mi eksciis: en Stata muzeo de kosmonautiko estas tradicio donaci al eminentaj vizitantoj suvenirojn, librojn pri la muzeo kaj pri Ciolkovskij. Do, la libro kun la presperanta artikolo, kun foto de la esperantista membrobileto de K.E. Ciolkovskij sendube nun estas en hejmaj bibliotekoj de ĉiuj sovetaj kosmonaŭtoj. Cetere, ankaŭ usonaj astronautoj vizitis la muzeon...

Dum en Kaluga estas modesta E-studrondo. Sed ni laboras kun espero. Kaj fine: ni veterano A.R.Kirjuŝin havis siatempe ioman kontakton kun Ciolkovskij pro Esperanto. Sekvante konsilojn de A.Vaitilavičius ("A"-5), mi provus eltiri la detalojn pri tiu ĉi unika fakto.

V.Ĉernov (Kaluga).

MEMORE PRI PROFESORO D.L.ARMAND

(1905 - 1976)

Kun David Lvoviĉ Armand min ligis longaj jaroj de amikeco surbaze de la komuna agado en Esperanto-movado.

Estante unu el la plej eminentaj sciencistoj en la sfero de fizika geografio kaj nelacigebla naturesploristo, li, malgraŭ serioza malsano, preskaŭ seninterrompe vojaĝadis tra la tuta lando, partoprenante diversajn kongresojn, konferencojn, seminariojn kaj simpoziojn. Dank' al sia komunikigema, bonvola karaktero D.L.Armand, renkontigante kun novaj homoj, tuj trovadis kun ili komunan lingvon, sendepende de ilia kulturnivelo.

Konatiĝinte kun la Esperanto-movado, li tuj aprezis la grandegan signifon de Esperanto por evoluo de la komunhoma kulturo, por interkompreno de homoj kaj interpopola amikeco, por la afero de paco. Kun la tuta pasio de sia granda animo li fordonis sin senrezerve al tiu ĉi movado, defendante ĝin kontraŭ tiuj, kiuj pro malkompreno, obskurantismo kaj kutimaj pseŭdosciencaj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj penis starigi barojn sur la vojo de tiu ĉi movado.

D.L.Armand estis aŭtoro de brilaj verkoj pri la eventuala rolo de Esperanto en geografia scienco, en scienc-teknika informado k.a. Estante dum multaj jaroj vicprezidanto de la E-Komisiono ĉe SSOD, li faris netrotakseblan kontribuon por evoluo de la sovetia Esperantomovado.

Li digne reprezentadis la sovetian Esperantomovadon en multaj universalaj Esperanto-kongresoj kaj prelegadis en dumkongresaj Someraj Universitatoj. Lia nomo estis vaste konata inter sovetiaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Mi havis feliĉon dum multaj jaroj havi kun D.L.Armand amikajn interrilatojn, kaj min ĉiam mirigis liaj neelĉerpebla energio kaj inventema iniciato. Lin ĝojigis ajna sukceso de la movado kaj suferigadis malsukcesoj, kaŭzitaj de la kontraŭstare fare de ĝiaj malamikoj.

La tuta agado de D.L.Armand, kiel sciencisto kaj sociaganto, estas brila modelo por la junularo, kiun li amis kaj kiu respondis al li per granda estimo. La forpaso de D.L.Armand estas granda frapo por la sovetia Esperantomovado. La tuta lia vivo estas ekzemplo de abnegacia servado al la popolo, al progreso kaj hela estonto de la homaro.

S. Podkaminer (Leningrado).

IOM PRI "INTERNACIA BILDKARTLUDO"

"Kara amik(in)o! Mi invitas Vin partopreni...". ktp. Kiu ne legis tion? Temas pri tio, ke al vi oni proponas sendi nur 1 bildkarton (au rublon, au ion alian), kaj post ioma tempo vi ricevos 3125 similajn pecojn. Goju: sen iuj klopodoj vi ricevos 312400% de profitoj!..

Ĉu tiel? Sajnas, ke la varbleteroj enhavas precizan kalkuladon. Jen vi sendas 1 rublon al la unua el la listo kaj dissendas 5 kopiojn al viaj geamikoj. En ĉiu el la kopioj via nomo okupas la kvinan lokon. La ludo daŭras. Via nomo aperas sur la kvara loko en 25 leteroj, sur la tria en 125, sur la dua en 625 kaj sur la unua loko en 3125 leteroj. Do, restas nur prizorgi vicon por aĉeti plej luksan araban meblaron. Eblas ankaŭ sendi dekon da kopioj, kaj baldaŭ propra "Moskviĉ" gaje eklekos apud via domo!..

Sajnas, ke ĉio estas korekta. Vi pliriĉiĝas. Ankaŭ ĉiuj 3 mil homoj, sendintaj al vi siajn rublojn, baldaŭ kalkulos la monon, kiu sendos al ili 9 milionoj da homoj, ilin siavice feliĉigos...

Panjo mia! 27 miliardoj da homoj, kiuj necesas por tio, ankoraŭ ne naskiĝis... Do, se la tuta homaro, inkluzive suĉinfanojn kaj analfabetojn, honeste partoprenos tiun ĉi ludon, ĉiu ricevonta monon priŝtelos 3 mil aliulojn!

Estas tamen memkonsolo: vi ne devigis iun veni al vi la monon, do antaŭ via konscienco vi ŝajne estas pura, ĉu? Sed vi sendis leterojn al viaj geamikoj, kiujn vi sendube trompis. Eĉ se vi ricevos monon, ĉu vi estas certa, ke viaj korespondantoj ne estos en la lasta tavolo, kiu ricevos nenion? Ja la ludoj komenciĝis jam delonge, kaj la novaj aliĝantoj riskas nur pagi, sen iu espero ricevi almenaŭ la elspezitan. Kaj same estos trompitaĵoj iliaj proksimuloj.

Do, temas ne pri elspezo de 1 rublo (bildkarto, poŝtmarko), sed temas pri lavango de trompoj, kie vi trompas mem kaj devigas trompi aliajn.

Konklude - la "internacia ludo" estas nura friponaĵo, en kiu l homo profitas je kosto de 3000 aliaj. Partopreno en tiu lavango de trompoj ne deĉas al esperantistoj kaj ĝenerale al honestaj homoj.

Do, ludu ŝakon, gitaron, pianon, damludon (en ambau senĉoj), sed ne ludu la "internacian" tromplavangludon!

G. Gercikov (Talgar).

KOMENTO DE LA REDAKTORO. La "ludo", kiun tutprave kritikas la aŭtoro, evidente havas lastatempe ioman disvastigon inter la esperantistaro, ĉar pri la sama temo venis ankoraŭ du artikoloj. Jam fragmentoj el ili:

"...ne taŭgas la titolo "ludo", ĉar tiu ludo tre similas almozpetadon, nur en pli vasta skalo" - M. Bronŝtejn, eksprezidanto de SEJM (Tiŝvin); lia artikolo estas titolita "La ora febro".

"Karaj gesamideanoj! Sparu vian tempon, ne partoprenu tiun ludon! Vian tempon tre bezonas la E-movado!" - I. Koroljov, subtenanto de SEJM (Bijsk).

Espreble la ĉi-supraj materialoj helpas al la legantoj kompreni, ke similaĵoj "ludoj" enportas en n'ajn vicojn la fremdan spiriton, de malsana aĝiotado, kiu povas danĝere kompromiti nian movadon antaŭ la ekstera publiko. La devo de ĉiu konscia esperantisto estas ne nur mem bojkoti tiajn "ludojn", sed aktive klarigi ilian kontraumoralan esencon al la samklubanoj, por ke ni ne plu revenu al tiu temo kaj uzu la spacon de SEJM-informiloj por pli valoraj aferoj.

Sed dume ni devas dediĉi atenton al tiu ĉi malagrable temo, ĉar la bacilo de la "ludoj" infektiĝis eĉ kelkajn spertajn aktivulojn. Ekzemple, D. Kolker (Zaporoĝje) en sia ĵus veninta repliko prenas sur sin la rolon de advokato, asertante ke la ludo estis publikigita en la revuo "Smena", de estas oficiale aprobita, kaj ke ĝi estas sociutila sama kiel "Semajno de letero". Nu, kaj tio kaj alio estas malvero, kion klare montras la fakto, ke kontraŭ la "ludoj" aperis felietonej en pluraj lokaj kaj centraj gazetoj (inkluzive "Smena" mem).

LA STATISTIKO DE SEJT-18

Partoprenis: Konferencan - 90, Paroligan periodon - 232 (16 gvidantoj, 116 komencantoj), Tendaron - 238. Entute en SEJT-18 estis registritaj 261 personoj - partoprenintoj de almenaŭ unu el la tri arangoj.

Lau particeco: partianoj - 20, komsemolanoj - 159, senpartiuuloj - 74, mankas donitaĵoj - 8.

Lau sekso: virinej - 147, viroj - 114.

Lau nacieco: rusoj - 164, hebreoj - 21, ukrainoj - 16, latvoj kaj litovej - po 14, tataroj - 8, germanoj - 5, estonoj - 4, baŝkiroj - 3, azerbajĝanoj, kazahoj, komioj, koreoj, lako, nenecoj kaj poloj - po 1, mankas donitaĵoj - 5.

Laŭ aĝo: naskiĝis en 1914 - 1, 1917 - 2, 1923 - 1, 1927 - 2, 1928 - 2, 1930 - 1, 1933 - 2, 1934 - 1, 1935 - 3, 1936 - 4, 1937 - 1, 1938 - 3, 1940 - 3, 1941 - 2, 1942 - 3, 1943 - 3, 1944 - 2, 1945 - 1, 1946 - 9, 1947 - 10, 1948 - 10, 1949 - 20, 1950 - 14, 1951 - 15, 1952 - 20, 1953 - 13, 1954 - 11, 1955 - 15, 1956 - 16, 1957 - 18, 1958 - 3, 1959 - 10, 1960 - 11, 1961 - 3, 1962 - 2, 1963 - 1, 1964 - 1, 1965 - 2, 1967 - 1, 1968 - 1, mankas donitaĵoj - 18.

Laŭ E-aĝo: 1927 - 1, 1935 - 1, 1936 - 1, 1956 - 4, 1957 - 3, 1958 - 2, 1959 - 3, 1960 - 3, 1962 - 2, 1963 - 2, 1964 - 2, 1965 - 1, 1966 - 2, 1967 - 5, 1968 - 11, 1969 - 5, 1970 - 15, 1971 - 6, 1972 - 17, 1973 - 21, 1974 - 19, 1975 - 54, 1976 - 73, mankas donitaĵoj - 8.

Laŭ respublikoj: RSFSR - 179, Ukrainio - 29, Litovio - 18, Kazaĥio - 17, Latvio - 13, Estonio - 4, Azerbajĝanio - 1.

Laŭ kleroj: supera - 102 (tiukvante 1 doktore kaj 5 kandidatoj de sciencoj), nefinita supera - 63, meza (inkluzive la mezan specialan) - 56, nefinita meza - 32, mankas donitaĵoj - 8.

Laŭ profesio: studentoj - 73, inĝenieroj - 51, instruistoj - 32, lernantoj - 26, teknikistoj - 19, laboristoj - 18, sciencistoj - 13, oficistoj - 11, medicinistoj - 4, ĵurnalistoj - 3, tradukistoj - 2, muzikistoj kaj pentristoj - po 1, mankas donitaĵoj - 7.

Kompilis A. Natinj (Petropavlovsk-Kamĉatskij), M. Bronŝtejn (Tiŝvin).

+ STATISTIKAJ DONITAĴOJ PRI BET-17

La tendaron partoprenis 240 personoj.

Partianoj - 20, komsomolanoj - 87, senpartiuuloj - 133.

Virinoj - 156, viroj - 84.

Rusoj - 100, litovoj - 51, estonoj - 27, latvoj - 19, ukrainoj - 16, hebreoj kaj hungaroj - po 8, belorusoj, francoj, germanoj, kartveloj, kazaĥoj, komioj, koreoj kaj tataroj - po 1.

Ĝis 20 jaroj - 38, de 20 ĝis 25 j. - 39, de 25 ĝis 35 j. - 56, de 35 ĝis 40 j. - 22, de 40 ĝis 50 j. - 21, de 50 ĝis 60 j. - 21, de 60 ĝis 70 j. - 29, de 70 ĝis 80 j. - 14.

E-igis en 1920 - 1, de 1921 ĝis 1924 - 2, de 1925 ĝis 1929 - 14, de 1930 ĝis 1933 - 3, de 1935 ĝis 1959 - 10, de 1960 ĝis 1964 - 16, de 1965 ĝis 1969 - 31, de 1970 ĝis 1973 - 35, en 1974 - 18, 1975 - 40, 1976 - 70.

El RSFSR - 102, Litovio - 52, Estonio kaj Ukrainio - po 27, Latvio - 20, Kazaĥio - 4, Moldavio - 3, Belorusio - 2, Karivelio - 1.

Instruistoj - 52, studentoj - 37, inĝenieroj - 28, laboristoj kaj lernantoj - po 26, oficistoj - 23, pensiuloj - 17, sciencistoj - 9, artistoj kaj medicinistoj - po 8, teknikistoj - 3, literaturistoj - 2, maristo - 1.

Sendis P. Jegerovas (Vilnius).

+ MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

Ĉ "Informan felieton de la scienc-teknika fakto de SEJW" №6(8). Ĝi enhavas: raporton pri la labore de la fakto en la agadjare 1975/76, aparte pri tiu en la kadroj de SEJT-18; informon pri fonde de Scienc-Teknika komisiono helpe al la fakestro; alvekon pri abenado de "Scienc revuo", anoncojn.

- la saman, №7(9). En la numero: plane de laboro de la fakto en la agadjare 1976/77, perspektiva plano por la jaroj 1976 - 1981; artikolo de M. Ziskandoviĉ "Celoj estontaj kaj proksimaj", alvoko de A. Gonšarov lanĉi fakan korespondadon, ideoj de legantoj por laboro de

la fako, informo de S.Krajnov "Pri hipofeo en Esperanto"; anoncoj. - la saman, N-8(10). La numero entenas: informojn pri fondiĝo de elektroteknika kaj konstruista sekcioj de la fako (gvidantoj M.Ziskandoviĉ kaj D.Gibulevskij), laborplanon de la elektroteknika sekcio; artikolon de M.Ziskandoviĉ "Pri algoritmo de la ST-informinterŝanĝo"; materialon de Pola E-Asocio pri projekto de internacia matematika terminaro; anoncojn; novaĵojn el E-lingva scienco kaj tekniko.

- "Jarlibron de SEJM" por la agadjaro 1976/77. En ĝi troveblas: listo de Honoraj Aktivuloj de SEJM; Regularo de SEJM; Regularo de SEJT; tabelo de junularaj tendaroj; la nova Taksa Demandaro (domaĝe, ke ne troviĝis loko por ekzemplo de la raportado: ja la novaj kluboj, kiuj pleje ĝin bezonas, ne posedas la pasintjaran "Sekretarian Libron", referatan en la "Jarlibro"); adresaro de SEJM-Konsilantaro; listo de SEJM-subtenantoj (6 kluboj, 65 individuoj); diversaj utilaj adresoj kaj aliaj sciindaĵoj. Kompare kun la antaŭaj "Sekretariaj Libroj", la "Jarlibro" iĝis pli riĉenhava, ankau ĝia nuna kajera formato estas pli oportuna ol tiu de SL.

DEDIĈE AL LA JUBILEO DE OKTOBRO

Dediĉe al la 60-jara datreveno de Soveta potenco la E-klubo "Verda Horizonte" planas en oktobro ĝi-jara organizi ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. La ekspozicio havos internacian karakteron. Do petu siajn eksterlandajn geamikojn helpi al la organizantoj de la ekspozicio, sendante al nia klubo deseĝnaĵojn de diversaj infanoj - pentremuloj.

Temoj de la deseĝnaĵoj estu pripacaj, prinaturaj, portretoj ktp. Maksimumaj dimensioj - 300x450 mm. Sur dorsa flanko de ĉiu deseĝnaĵo estu notitaj nomo, aĝo, urbo (lando) de la aŭtoro kaj temo de la deseĝnaĵo. La adreso: SU-492018 Ustj-Kamenogorsk-18, abonkesto 312, Esperanto-klubo "Verda Horizonte", al Anonin Boris.

Ni antaŭdankas vian helpon, karaĝ geamikoj.

B.Anonin (Ustj-Kamenogorsk).

DENOVE PRI "MOSKVAJ NOVAĴOJ"

En la poreksterlandaj eldonoj de la ĵurnalo "Moskvaj Novaĵoj", N^o52, 1976, krom la konciza sciigo (vidu "A" - p.43,54) - tamen ne anstataŭ ĝi, Kiel asertas "Kurte" N-11 - aperis ankau dukolumna informo - intervjuo pri la IX-a Konsultigo de la gvidantoj de E-asocioj el eŭropaj socialismaj landoj. Ĝi estas presita en ĉiuj kvar lingvoj: angle, araba, franca (paĝo 13) kaj hispana (p.12). En la intervjuo pri la rolo kaj ebloj de Esperanto parolas k-doĝ N.Aleksiev, M.Isajev kaj D.Blanke. Interesigantaj kluboj povas ricevi la anglan numeron de la ĵurnalo ĉe V.V.Samodaj (113519 Moskvo, ul.Krasnogo Maja 8 - 2 - 107).

DJFLANKAJ PRIDISKUTOJ

Dum la 20-a - 28-a de januaro la prezidanto de Krasnojarska E-klubo, komitatano de SEJM V.Sapoĵnikov vizitis Barnaulon. Dum la resto li havis konversaciojn kun geaktivuloj de Barnaula E-klubo V.Kazanova, A.Gonĉarov, J.Vladimircov, V.Ekol. Estis preparolitaj problemoj de disvastigo de E-movado en Siberio, funkciado de ambau kluboj kaj daŭrigo de la kunlaboro; temis ankau pri programo de OSEJT.

40 MINUTOJ PER TELEVIDO

La 20-an de januaro okazis 40-minuta elsendo "Kontakto" de Krasnojarska televido. Dum ĝi elpaŝis kun interesaj rakontoj pri laboro de la urba E-klubo ties geaktivuloj V.Sapoĵnikov, S.Bronov, V.Lysenko, I.Taskina. Tio estis jam la tria elsendo dum la du jaroj de ekzisto de la movado en Krasnojarsk.

AKIREBLAS VORTARETOJ

- E-rusa + rusa-E. (parto el la lernilo de I. Sergejev "Fundamentoj de Esperanto) ĉe Cibulevskij Dmitrij Miĥajloviĉ - 310024 Ĥarkov-24, Ĝajkovskogo 25 - 11. Unu ekzemplero kostas 1,45 rub., inkluzive la poŝtelspezojn.

ALVOKO AL LA KORESPONDEMULOJ

Se vi deziras korespondi pri pedagogio kaj aliaj temoj, turnu vin al: Emile Thomas, 18 rue de l' Iroise, 29200 BREST, Francio. Li havas la adresojn de kolegoj, kiuj partoprenis en la Internacia Remontigo de Freinet-Edukistoj (RIDEF 76) en Pollando kaj, konstatinte la gravan rolon de Esperanto en tiu aranĝo, decidis ek- aŭ plulezi la Internacian Lingvon kaj korespondi kun eksterlandaj instruistoj.

Laŭ letero de Franca ILEI-sekcio:
N. Starodubcev, estro de Lerneja fako de SEJM.

RAPIDU MENDI

la libron de N. Gordienko-Andrianova "Zapaliv ja u serci vagonj" (ukrainlingva romano pri la fama E-poeto Veselij Jeroŝenko) - Kiev, eldonejo "Veselka", 1977, prezo 54 kop. - la adreso: 252094 Kiev, Popudrenko 26, magazin "Kniga - poĉtoj".

ŜANĜIGIS ADRESO

- la nova hejma de Danielo Kolker estas: 330098 Zaporozĵje, str. Poljakova 11 - 40.

HASKIGIS FILO

la 1-an de februaro en la E-familio de Nina kaj Aleksandro Kogan (Tiĥvin). Niajn gratulejn!

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 22.2.77.
Ĉiujn materialojn por "Aktuale" sendu laŭ la adreso de la redaktoro:
121019 Moskvo G-19, do vostrebovanija, Aroloviŝu Viktoru Semjonoviŝu.